Heinrich Heine,

# Fraŭlino ĉe la maro staris

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Fraŭlino ĉe la maro staris
kaj ĝemis kun sopiro,
kortuŝon tiel grandan faris
al ŝi la sunsubiro.

Fraŭlin', gajiĝu senbedaŭre,
vin olda scen' katenas:
la sun' foriras ĉi-antaŭe,
postdorse ĝi revenas.

*Traduko de la Germana poemo "Das Fräulein stand am Meere" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Kálmán Kalocsay *(Kalmano Kaloĉajo, ∗1911 – †1976).*

*Arg-471-1078 (2010-05-22 11:49:29)*

Heinrich Heine,

# La fraŭlino ĉe la maro

*tradukita de Hein Wernik*

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

*Traduko de la Germana poemo "Das Fräulein stand am Meere" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Hein Wernik en 2007-09.*

*Arg-471-910 (2010-05-26 19:14:07)*

*Tiu ĉi traduko aperis en la Septembra numero de la revuo "Forumo de Esperanto Nederland". La adreso de s-ro Hein Wernik estas: Prinsenlaan 26, NL-6542 TB Nijmegen, Nederlando.*

Heinrich Heine,

# Dum sun-subiro staris

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Dum sun-subiro staris
Ĉe l' maro la fraŭlin'.
Suspirojn longajn faris,
Kortuŝis tio ŝin.

„Ĉu vi pri tio miras?
Malnovas tio ĉi!
Ĉi tie ĝi subiras,
Deposte revenas ĝi."

*Traduko de la Germana poemo "Das Fräulein stand am Meere" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1985-05.04.*

*MR-184-1 / Arg-471-909 (2008-05-12 17:22:43)*